

Bô Yin Râ

# LA VOJO AL DIO

La civitana nomo de Bô Yin Râ estis  
Joseph Anton Schneiderfranken

El la Germana originalo  
(„Der Weg zu Gott“, 1924) tradukis  
A.Rehfeldt (<http://boyin-ra.org/esperanto/>)

Kober'sche Verlagsbuchhandlung  
Zuriko

„Mi vidas vin hasti kaj rapidi, mia amiko!  
Kio estas la celo de via vojo?“

Tiun demandon mi direktis al multaj homoj, kaj ili indikis al mi diversajn celojn.

Aĥ, kiom malmultaj sciis, ke ili rapidis al iu ajn celo, perdinte la VOJON kondukantan al la alta celo, kiun ili iam esperis atingi:

la VOJON AL DIO!

\*

## ILUZIO, KREDO KAJ FIDO

Mi ne volas levi la demandon, ĉu por la homo de tiu ĉi tero estas „*necese*“ kredi je „*Dio*“? ...

Ĉiuj, kiuj *vivis* de tia kredo, ĉiam kaj en ĉiuj zonoj *jesis* tiun demandon. Tio tre diskreditigis la *demandon* kaj ĉian *respondon*.

Mi volas levi la demandon: kiel povas *ebliĝi*, ke tera homo asertas, ke *li kredas je DIO*?

Ekzistas kelkaj „sanktaj“ libroj de antikvaj popoloj, en kiuj vi povas legi, ke tie kaj tie ĉi „*dio*“ iam „*aperis*“ al kredanto.

Se tia feliĉigito asertas, ke li *kredas* je tiu dio, tiam li eble havas, por si mem, *rajton* pri tiu kredo.

Kio ajn „*aperis*“ al li: li *rigardis* la *aperaĵon* kiel la „*dion*“, kaj se li diras, ke li „*kredas*“, li diras ne pli ol ke li kredas je *aperaĵo* kaj ne ekkonas la iluzion, kiu igas lin opini, ke li vidis „*dion*“.

Sed kiel povas *vi*, al kiu okazis *nenio* tiuspeca, aserti, ke *vi kredas je Dio*?

Nur en via *pensado* vi *elpensis* al vi „*dion*“ laŭ via bildo.

En imagita *bildo* vi levis *vin mem* al *perfekteco*, kaj tiu *elpensita bildo* estas por vi „*dio*“. —

Vi estas *adoranto de bildo*, kaj servanto de la *idolo* kreita de vi mem.

Vi ne povas eliĝi el via propra malvasteco, kaj tial vi ligas vin al via malvasta iluziado.

Vi mem devas *formi* tion, kion vi volas *vidi formita*, kaj sekve vi opinias, ke iu devas esti forminta ankaŭ tiun ĉi vastan *mondon*, kiu fariĝas perceptebla al vi per viaj sensoj, kaj tiun forminton nur *supozitan surbaze de via malvasta opiniado* vi nomas via „*Dio*“, – la propran iluziadon vi nomas via „*kredo*“. – –

En tiu ĉi mondo ĉirkaŭanta vin, vi vidas multon ordigitan tiel, kvazaŭ ĝi estus ordigita pro certaj *celoj*, kaj ĉar vi mem, *kiel formitaĵo de tiu sama mondo*, samamaniere provas atingi per taŭgaj rimedoj *viajn* celojn, vi opinias, ke malantaŭ tiu ĉirkaŭaĵo estas iu, kiu devas egali *vin*, provante atingi *siajn* celojn. – –

Ne ĝenas vin, ke *multe pli* en tiu ĉi mondo *tre malmulte* konformas al tiu supozita laŭceleco, kaj ke la celkonscia „*kreinto*“ estus grandega *fusulo – eĉ pli nekapabla ol lia laŭsupoza „kreitaĵo“* – se li, laŭ via iluziado, estus konkludebla el faraĵo, kiu *atingas* kelkajn celojn kaj *ne atingas* aliajn. –

Ne ĝenas vin, ke tro ofte tio, kio ŝajnis al vi esti „*celo*“, estas *atingata*, sed poste *detruata de io alia*, kio ŝajnis al vi ankaŭ esti progresigata treege celkonscie.

Tie ĉi vi haltas, kaj neniom embarasite via opiniado postulas „*nesondeble profundan saĝon*“, kiu bezonas ankaŭ *sen-sencaĵon* por agi sencoplene.

El la fakto, ke ĉiutempe kaj en ĉiuj popoloj de la tero la homo kreis al si ion por *klini* sin antaŭ tio kreita, vi konkludas, ke la kreitaĵo de via iluziado devas esti konforma al iu *realo*, – kaj ĉar via pensado povis *elpensi* lin, vi „*kredas*“, ke

la „*dio*“, kiun vi *mem kreis*, *ekzistas*, kaj vi scias diri multajn diversajn aferojn pri li.

Vi vere ne estas modesta, kaj eĉ en via multe laŭdata „*humileco antaŭ la Eternulo*“ vi ne konscias, kiom strange vi eksplikas la ekziston de via „*dio*“ *el vi mem*. —

Vi trovas vin ekzistanta *tie ĉi*, kaj tial *ankaŭ* la „*dio*“ kreita de vi mem „*devas*“ — ĉar vi volas tion — esti ie en „*ĉielo*“.

Ĉu vi nur ripetas tion, kion aliaj diris al vi pri „*Dio*“ kaj la „*atributoj de Dio*“, aŭ ĉu vi malestimas tiun malnovan „*fabelon*“ kaj mem *elpensas* al vi la „*dion*“, — ambaŭkaze vi estas ensorĉita en la sama malvasta cirklo, kiun via arogante fiera *superstiĉo* igis vin desegni, eĉ se vi sentas vin „*supera*“ al ĉia „*kredo*“, kaj spirite „*libera*“.

Mi volas malligi vin de tia iluzio, mia amiko, kaj montri al vi, ke tamen estas *eble „kredi je Dio“*. —

Mi volas montri al vi, ke oni kreu je „*Dio*“, kiu *ne* estas antaŭe *kreata* de via aŭ mia malvasta iluziado, kaj kiun neniam povas atingi iu „*pruvo*“ ricevinta sian forton nur en *pensado*. — — —

Unue ni devas interkonsenti pri tio, kion la vorto „*Dio*“ *signifu* por ni tie ĉi.

Ke mi ne uzas la vorton „*Dio*“ por indiki iun fantomon de erara *pensado*, fantomon kiu ŝajnas reala nur al *iluziado*, tio jam klariĝis al vi el la hela fono de miaj unuaj vortoj. —

Ni volas proksimiĝi al la *realo*, kiun la *pensado* neniam povas *kapti*. — —

Tiun eterne *estantan* ni volas renkonti sur nia vojo. Via interna okulo devas esti *sobra* kaj *klara*, se vi volas *ekkoni* lin.

*La trompajn figurojn de via pensado vi devos forgesi.*

Kio renkontos vin, estas tio *unu*, kio *ne* konas ion *duan* apud si, – sed kio manifestas sin mem *infinitoble*, kie ajn ĝi povas manifestiĝi. –

*Vi mem* estas ĝia manifestaĵo, kvankam vi ankoraŭ ne scias pri tio, kaj *nur en vi mem* povas *tio manifestiĝanta* fariĝi ek-konebla al *tio manifestata*. –

Ankaŭ la *trompiĝon* vi renkontis *en vi mem*, – sed nun vi trovu en vi mem *la veron!* –

Ne tro malfacile estas por vi, *distingi* inter *vero* kaj *mem-trompo*.

Multaj el tiuj, kiuj estis *trompintaj* sin mem kaj tiam *vekiĝis* el siaj revoj, perdis ĉiun *kuraĝon*; sekve ili tiom timas subfali al *nova* trompiĝo, ke ankaŭ por la *vero*, se ĝi iam renkontas ilin, estas malfacile ne aspekti al ili kiel trompa bildo...

Vi ne devos doni vin, same kiel ili, al sento de *amareco*, ĉar en kio vi *ne* sukcesis naŭdek naŭ fojojn, en tio vi eble je la centa fojo *sukcesas!* – –

Kiu scias, ĉu *antaŭe* jam estis veninta via *tempo* por povi *renkonti* la veron?

Eble en via malpacienco vi nur *volis* renkonti ĝin, sur vojo, kiun ĝi devas *eviti*. – –

Sed se vi estas sur *ĝusta* vojo, kaj *preparis* vin por *ekkoni* la veron, tiam vi vere ne plu estos en *dubo*, ĉu tio, kio montriĝas en vi, estas *la vero mem*, aŭ *trompa bildo* kreita de vi. –

En tio, kio *en vi mem* estas vero, la eterna vero sin *atestos!*

La *lumo*, kiu lumas el *si mem*, *lumigos* vin, kaj ĉiuj lampoj kreitaj de vi, por ke ili heligu vian vojon, estos *apenaŭ videblaj* al vi en via radianta heleco. –

Vi renkontos vian propran *vivon* en ĝia eterna abundeco; – vi vidos *vin mem releviĝi* en lumo el via tera tomba nokto, per la forto de la lumo!

Vi trovos vin mem en *unuiĝo* kun „Dio“ – *la fundo de ĉiu estado!*

Dirante „MI“ al vi mem, vi lernos kompreni, ke vi tenu *lian* „nomon“ *sankta!* – – –

Dum mi tiel parolas al vi, vi sentas en vi *internan fortegon*, – ĉu ĝi fariĝas *forte* sentebla al vi, aŭ ĉu ĝi frapas unue nur *milde* je la firme fermita pordo de via koro ...

Io estas en vi, kio aŭdas miajn vortojn *pli bone* ol via *intelekto*, kiu volas *alproprigi* al si nur la *sencon de la frazoj*. – –

Tiu „*io*“ estas la forto de la *fido*, forto kiun vi portas en vi kaj *ankoraŭ ne konas*. –

Vi apenaŭ pretas koncedi, ke ĝi estas trovebla en vi.

Vi dejunece donis vin tro forte al la *pensado*, kaj vi opiniis, ke vi *trovas* ĉiun finan *certecon*, kiom ĝi estas atingebla por homoj, nur per *pensado*. –

Sed via pensado milfoje *trompis* vin, kaj eĉ hodiaŭ vi estas *sklavo* de tio, kion vi *elpensis* al vi.

Tamen vi *timas* fali en *vakuan nenion*, se vi iam konfidus al io alia *pli ol al via pensado*...

Estas nur tiu *timo*, kiu volas malhelpi vin konfidi al la forto de *fido*. –

Sed *vane* vi aŭdos miajn vortojn, tiom longe, kiom vi lasas ilin paroli nur al via *pensado*, kaj deziras trovi ilin *konfirmitaj* nur *en pensado*.

Ne opiniu, ke mi tie ĉi parolas *malrespekte* pri la forto de *pensado*!

Mi tre bone scias, ke ekzistas *multego* en tiu ĉi tera vivo, kiu malfermiĝas nur al matura *pensado*, kaj mi multe *honoras* tion, kion la homaro ŝuldas al tiuj, kiujn ĝi nomas siaj *pensuloj*.

Sed tio, kio povas esti *elpensata*, estas *io tute alia* ol tio, kion nur la alta forto de *fido* povas fari spirite kaptebla al vi.

Vi komprenos, ke mi tie ĉi ne parolas pri „kredo“, kiu nur „*opinias vera*“ tion, kion ĝi „*kredas*“. –

Tia „*kredo*“ konsistas nur en *supozado*. –

La *forto de fido*, pri kiu mi parolas, vere estas *alia* afero.

Ĝi havas *nenion komunan* kun *opiniado*, *supozado* aŭ *konkludado*. Kiu sin donas al la *forto de fido*, eĉ se li sentas ĝin unue nur en *plej milda* intenseco, tiu certe ne devos doni sin al iu *opinio*.

Li tuj sentos, ke regas en li *forto* povanta konduki lin al *ekkonoj*, kiujn „*karno kaj sango*“ *neniam* malkaŝus al li. –

Kion vi nun *sentas* en vi, kvankam vi ankoraŭ ne povas *interpreti* ĝin, tio estas la *forto de fido* – eble unue nur en sia *plej delikata* formo ...

Estas en vi io, kio dezirus *konsenti* al miaj vortoj, se via *pensado* ne penus *malhelpi* ĝin per objetoj de ĉiu speco. – –

Sed se vi volas resti la ĉiam obeema *sklavo* de via *pensado*, vi povos atendi malmulton de la *forto de fido*, kiu volas, ke vi estu *libera* kaj *nekatenta*! –



Nur se vi povas *malligi* vin de via *pensado*, vi trovos la *forton de fido* aganta en vi.

Vi moke priridus ĉiun metiiston, kiu intencus fendi *feron* per *hakilo*, kaj vi supozus frenezon, se iu volus distranĉi fenestran vitron per *segilo*. –

Sed ĝis nun vi provas fari ion similan, – kaj vi ankoraŭ ne rimarkas, ke vi trompas vin mem. –

Per *tute maltaŭga rimedo* vi provas atingi ion, kio tiunmaniere *neniam* estos atingebla.

Vi volas kvazaŭ faligi arbojn per tranĉileto, kaj elfosi ercon per la nudaj manoj.

Mi devas diri al vi, ke la *forto de pensado* ja estas *tre elprovita ilo*, se temas pri la esplorado de *teraj aferoj*, – sed ke ĝi tuj devas *malsukcesi*, se vi penas atingi per ĝi ekkonon pri io, kio radikas en la *spirito*. –

Tie ĉi povas helpi al vi *nur la forto de fido*.

Ne kredu, ke ĝi estas malpli taŭga por doni al vi *ion certan*, ol la forto de pensado donas al vi *en tiu regiono*, kie nur ĝi estas la taŭga ilo. –

La forto de fido havas nenion komunan kun „*kredo*“, kiu „*opinias vera*“ tion, kion oni „*kredas*“, aŭ *supozas* „*kredi*“. *La forto de fido estas la interna certeco, ke oni atingos tion, kion ĝi promesas.*

Tuj kiam vi „*fidas*“ *Dion* en *tia* maniero, vi certe ne kredos al tiuj, kiuj provas prezenti al vi malnovan *iluzion*, elkovitan en la malvasteco de ilia povo de ekkono, kiel *veron!*

Vi fidus nur *vin mem*, se vi konfidas al la *forto de fido*. – –

Vi trovos ĝin aganta en *vi mem*, kaj tio, kion ĝi havas por malkaŝi al vi, havas sian bazon *en vi mem*. –

En vi vi *spertos*, kion ĝi povas *instrui* al vi.

*Nur tio, kion vi spertas en vi, mia amiko, estos propra al vi.* –

Kio ne fariĝas tiom *certa* al vi kiom via *propra tera korpo*, tion vi neniam devos nomi „*io certa*“.

Kion vi ne povas *ekkapti*, kiel vi ekkaptas *vin mem*, vi *certe ne ekkaptis*.

Kion vi ne povas „*kredi*“, kiel vi kredas je *via propra ekzistado*, tion vi ne nomu „*kredo*“!

Mi volas gvidi vin al „*kredo*“, kiun vi povas *responsi* antaŭ vi mem.

Mi volas gvidi vin al „*kredo*“, kiun vi neniam *malkonfesos*.

Mi volas gvidi vin al „*kredo*“, kiu *transdaŭros* vian vivon sur la tero.

Nur *tiam* vi povos atesti, ke vi vere devas *kredi* je „*Dio*“.

Nur tiam ankaŭ *tiu*, je kiu vi „*kredas*“, rigardos vin kiel „*kredanton*“. –

*Antaŭe* ĉiu „*konfeso*“ estas *mensogo*. Antaŭe ĉiu „*konfeso*“ estas nur *konfeso pri via aŭ aliula iluzio* opiniata sankta.

Sed se vi unufoje *spertis* tion, kio *estas* spertebla, tiam vi estos *liberigita* de ĉiu iluzio.

Se vi *spertis* tion, kion nur la *forto de fido* povas doni al via sperto, vi estos akirinta *certecon*, kiun oni eterne ne plu povos *forpreni* de vi. –

Se vi konfidis vin al la *forto de fido*, vi iam vere venos tien, kie vi povas tute prave konfesi:

„*Mi kredas je DIO.*“

## SCIO CERTA

Vi certe neniam atingos *scion certan*, se ne antaŭe la *forto de fido* lumigis al vi la vojon. –

Vidu, ankaŭ mi iris sur vojoj de eraro, kiam mi ankoraŭ ne konis min mem. –

Ankaŭ mi estis sklavo de mia iluziado, antaŭ ol trovis min *tiuj*, al kiuj mi *apartenis* longe *antaŭ* la tempo, kiam mi unuafoje spertis min en tera korpo kiel filon de tiu ĉi tero. – – –

Mi rajte povas alporti sciigon pri tio, kio estigas *certecon*, ĉar iam mi mem devis sperti, kion *iluzio* kapablas fari. –

Kiu sekvas miajn vortojn, tiu trovos *sekuran* gvidadon.

Mi vere fariĝis *sperta* pri la vojo kondukanta al la *celo*, kaj iam mi *mem* fariĝis „*vojo*“, antaŭ ol oni donis al mi la taskon montri la vojon al *aliuloj*. – – –

En la eterne lumanta *lumo* mi fariĝis konscia pri *mi mem*, kaj nur tiam doniĝis al mi la *devo* alporti *lumon* ankaŭ al tiuj, kiuj estas en mallumo. – – –

*Nur tiam* oni ordonis al mi *veki* el la *sonĝo de mallumo* ĉiujn, kiujn mia vorto povas atingi. – – –

Ankaŭ mi iam devis konfidi al la *forto de fido*, antaŭ ol mi atingis *scion certan*. –

Kaj *pli grandan* konfidon oni postulis de mi, ol iam *vi* devas montri. –

Venis tago, kiam mi devis prepari min por definitive *forlasi* tiun ĉi surteran vivon, kaj nur la *forto de fido* povis instigi min trapasi *provon*, kies rezulto estus povinta alporti al mi la

*finon* de mia surtera vivo; anstataŭe ĝi reale alportis al mi la *maldorman*, *konscian vivon*, – kaj tion mi antaŭe ne *suspektis* kaj multe malpli *sciis*.

Mi do pensas povi atesti, ke al la *forto de fido* oni konfidi *povas*.

Kaj mi plue diras al vi, ke vi atingos scion certan laŭ la mezuro de via *konfido* al la alta *forto de fido*. –

Tie ĉi, *tute ne* ekzistas *kontraŭeco* inter „*fido*“ kaj „*scio*“, ĉar „*fido*“ estas *kondiĉo*, se vi volas atingi „*scion*“. –

La *forto de fido* *kreas* en vi la *eblecon* atingi scion certan.

Tiom longe, kiom vi ankoraŭ *dubas* kaj ne *povas konfidi* vin al la *forto de fido*, vi ne rajtas postuli, ke vi iam fariĝu „*sciinto*“. –

Tie ĉi ekzistas speco de ĉeno:

Necesa estas *konfido* al la *forto de fido*, kaj tiu ĉi sama *forto de fido* estigas en vi la *konfidon*, kiun vi bezonas por atingi *scion*. –

„*Scio*“ tie ĉi ne estas la ekkono de iu ajn *kaŭza interrilato!*

„*Scio*“ tie ĉi estas la rezulto de *interna ekkona certigo*, kiu ne plu konas iun *dubon* kaj estas firma *en si mem*. –

Kiu atingis *tian* scion, al tiu la „*pruvo*“ postulata de *pensa*, tera scio estas nur *provizoraĵo*, kiun li *ne bezonas*, ĉar *lia scio mem* estas samtempe *pruvo de la sciaĵo*. –

Homo, kiu premas sur la butono de elektra sonorilo, ne bezonas „*pruvon*“ de tio, ke signalo *povos* eksoni, – nek bezonas *konon de la kaŭza interrilato*, por sonigi la sonorilon; tiel same, spirite ekscianta homo *interne certigas* pri la sciaĵo, sen bezoni „*pruvon*“, kaj sen okupiĝi pri la kaŭzaj interligiloj necesaj por ke la *sciaĵo* venu al lia *konscio*...

Kiu volas atingi *scion certan* tiel, kiel vidanta homo *vidas*, eĉ se li tute ne povas *klarigi* al si la procezon de vidado, tiu devos akcepti, ke tiu *scio* ne doniĝos al li *sen alta helpo*, same kiel vidanto devas akcepti, ke li povas *vidi* nur tiam, se tre facile lezebla organo de lia korpo tion ebligas...

Tie kaj tie ĉi, *kondiĉo* devas esti plenumita, por ke tio celata fariĝu *atingebla*. –

La plej eta maldiafaniĝo de la kristalino de via okulo *rabos* al vi, aŭ almenaŭ *malhelpos*, vian *kapablon* vidi. Nur per la helpo de malgranda organo de via korpo vi povas vidi. –

Sed se vi volas rigardi en la *vastaĵojn de la stelara ĉielo*, aŭ ekkoni *plejmalgrandaĵojn*, vi bezonos la helpon de *optikaj instrumentoj*, kiujn la homo mem elpensis kaj lernis produkti.

Ĉio ĉi ŝajnas al vi tute ĝusta kaj laŭorda, kaj vi certe ne postulos, ke vi povu vidi *sen* okuloj, aŭ ke la ringoj de Saturno videbliĝu al vi *sen* la helpo de teleskopo.

Jam antaŭ longe vi ekkonis, ke eĉ la plej forta teleskopo ne povas montri al vi *la plej malproksimajn stelojn*, kaj ke la plej bona mikroskopo ne sufiĉas por vidi la *plej malgrandajn partiklojn*, al kies ekzisto vi povas *konkludi*, kvankam ili neniam montriĝis al homa okulo. –

Sed en *spiritaj aferoj* vi opinias *ne bezoni* ian helpon! –

Vi ne hezitas interrilati kun via „*Dio*“ en plumpe familiara maniero, kaj vi postulas en malsaĝa, senmezura aroganteco, ke inter vi kaj via „*Dio*“ nenio alia devu stariĝi...

Vi egalas *infanon*, kiu volas kapti la *lunon*, ĉar tiu ĉi ŝajnas al ĝi ne pli malproksima ol la ludilo, kiun vi pendigis por ĝi al la fenestro. –

Eĉ *inter viaspeculoj* sur tiu ĉi tero vi faras grandegajn *distingojn de rango*.

Kiel ajn vi *nomas* la „grandulojn“, antaŭ kiuj vi kliniĝas: – ili ĉiuj estas *homoj* kiaj vi, eĉ se vi sentas, ke ili superas vin per *scio kaj kapablo*, per *saĝo kaj forto*, aŭ nur per *heredita rega potenco*. –

Kiom *malalte* vi devas pensi pri la *regno de la spirito*, se vi ne iomete *sentas*, ke ankaŭ en tiu regno *ŝtupo* sekvas *ŝtupon*, kaj ke leviĝas preskaŭ senfina *sekvo da hierarkioj*, antaŭ ol estas atingeblaj la *plej altaj* spiritaj princoj, kiuj, vivantaj en la plej interna *lumo de la Dieco*, reale respondas al la bildo, kiun homa fantazio kreis al si pri la plej altaj „anĝeloj“, pri „*serafo*“ kaj „*kerubo*“. – –

Viaspeculoj fariĝis al vi „*princoj*“ sur tiu ĉi tero, kaj se vi taksas la *krean potencon* de la homa spirito *pli alte* ol ĉiun rangon de nobeleco, tiam vi scias pri homoj, kiuj sukcesis fari ion preskaŭ *superhoman* en tio, kion vi surtere nomas „*spirita*“, – sed eĉ *la plej alta el ili*, kiun vi eble ĉi-rilate honoras, estis, dum sia surtera vivo, apenaŭ sur la *plej malalta* ŝtupo de tiuj, kiuj jam vivas en la esenca *spirito*. – – –

Kiel do vi povas imagi, ke *vi*, kiu eĉ surtere klinas vin antaŭ „*plialtuloj*“, estas tiom proksima al via „*Dio*“, ke inter *vi* kaj *li* nenio alia povas ekzisti? –

Nu, se temas pri tiu *idolo*, kiun vi *mem* kreis al vi laŭ via bildo, – tiam vi certe estas prava. –

Sed se vi volas unuigi vin al via DIO, kiu estas kaj restas en *estado* de eterne ĝis eterne, kaj kiu *manifestiĝas* en vi, tiam vi devos *rezigni* pri tia malsaĝo. –

Vi tiam lernos *el vi mem* ekkoni, ke vi tie ĉi bezonas *helpon*, kaj tuj kiam vi tion *ekkoni*s, la helpo *doniĝos* al vi. – – –

Ekzistas *helpo* por *ĉiu*, tuj kiam li aŭ ŝi *volas ricevi ĝin*. –

La eterna *pralumo mem*, pri kiu vi imagas, ke ĝi estas tiom facile *ekkonebla* sen interŝtupo, kreis al si la *helpantojn* sur tiu ĉi planedo, kaj ili scias *atingi* vin, tuj kiam vi mem *volas* lasi vin atingi! – –

Per *aliaj* vortoj kaj ofte ankaŭ per *alia parabolo* mi parolis al vi pri tiu helpo en *aliaj* libroj, sed tie ĉi mi volas paroli al vi pli pri la stato, en kiu vi *mem* devas troviĝi, se vi volas ekpaŝi sur la *vojo al Dio*. ...

Kiam vi *ekiris* sur tiun vojon, vi tre baldaŭ ekkonos, ke vi ne *povas iri plu sur ĝi*, se ne doniĝas al vi *alta helpo*. – –

Se vi tion *ekkonas*, vi estas preta *ricevi* helpon. –

*Ne maltrankviliĝu* pri tio, *de kie* tiu alta helpo *venas!*

Sed estu, per la *forto de fido*, certa en vi mem, ke tiu helpo *devas doniĝi* al vi!

Vi tiam kun plena certeco ĝin *ricevos*, eĉ se vi ne povas *suspekti*, *de kie* ĝi atingas vin.

Sole kun *tiu* helpo vi atingos *scion certan*. – –

Konfidante al la unua *ŝajno*, vi eble opinios sperti nur *propran ekkonadon*, kaj apenaŭ suspektos, ke *aliulo* parolas al vi en via animo: – unu el tiuj, kiuj vivas sur tiu ĉi tero kaj *samtempe* estas konsciaj en la *spirita mondo*, kvankam nur sur la *plej malsupra* ŝtupo de la hierarkio, kies pli altaj ŝtupoj devus resti *neatingeblaj* por vi kiel tera homo.

Nur en viaj *plej altaj* momentoj vi spertos tiun helpon, ĉu vi *ekkonas* ĝin aŭ *ne*. – –

Sed tiam ree venos la *mallumaj* horoj, kaj vi ĝemos en via mizero...

Vi sentos vin „*forlasita de Dio*“, kaj ne scios kie trovi rifuĝon.

En tiu tempo vi ne *devas perdi la kuraĝon*.

Poste, *subite* venos al vi nova „*interna alparolo*“, kaj ĉio kio *premis* vin, iom post iom *foriĝos de vi*. –

Per *persisteco* vi atingos la celon, kaj vi ekkonos, ke kondukas vin *altaj potencoj*.

Vi estas preparita per la *forto de fido*.

*Scion certan* vi volas nun atingi.

Ĝi vere *doniĝos* al vi, se vi serĉas en *vi mem*.

Dum vi ankoraŭ *faletas* kaj ne *scias*, kion vi *volas*, vi *vane* serĉos scion certan. –

Vi unue devos certigi pri *vi mem*, se vi volas esti levata en la *spiriton* al la *certeco* de spirita „scio“. – –

Sed se vi konfidis al la *forto de fido*, vi vere ankaŭ *certiĝis* pri *vi mem*. –

En via *plej interna interno* vi malkovros la *fonton de ĉiu saĝo*. Vi akiros en *vi mem* „*scion*“, kiun la ekstera mondo *ne* povas doni al vi. –

Nur en *vi mem*, mia amiko, povas doniĝi al vi „*certeco*“. –



## SONĜO DE LA ANIMOJ

Ĉirkaŭitaj de la mallumo de teranimala ekkonado, la animoj sur tiu ĉi tero estas tenataj, fare de ilia *propra* volo, en profunda *dormo*...

Ilia tuta „spertado“ estas nur *sonĝo*, antaŭ ol ili vekigis.

Ili ankoraŭ ne povas kompreni, kio estas maldorma, *reala* spertado.

Nur *vekiĝinto* scias *distingi* inter *reala spertado* kaj la *trompa mondo* kreita de li mem – prezentita al li de lia *sonĝo*.

Nur malofte penetras en la *sonĝon* la *konscio*, *ke oni sonĝas*...

Ligita al la mondo de l' *sonĝo*, oni ne havas la forton *eligi sin* el la *sonĝo*. –

La *dormo* estas pleje tro profunda, – tro sekure ĝi gardas la *sonĝon* eĉ tiam, kiam la voko de la maldorma realo jam povus esti aŭdata en ĝi. – –

Ŝajnas esti preskaŭ neeble iam vekti la animojn. Ĉiu „veko“ preskaŭ egalas „miraklon“.

La animoj ja *volas* *sonĝi*. –

Mankas la *volo* al *vekiĝo*. –

Enprofundiĝintaj en la regno de l' *sonĝo*, la animoj *timas* la finon de sia *sonĝado*.

Nur tion, kio ensonĝe fariĝis al ili *sonĝita* „sperto“, ili rigardas kiel spertindan...

Ili horore *timas* devi *forlasi* la *sonĝon*. –

En sonĝo ĉiu animo reve kreas al si sian *propran* mondon, kvankam multaj kreas al si *similan* mondon.

Ne aliamaniere ĝi sonĝe kreas al si sian malproksiman, fremdan „*dion*“ en neatingeble alta supermondo, kaj ne scias, ke ĝi kreis nur luman bildon *de si mem*, por adori *sin mem* en tiu bildo.

Kiel ĝi povus ekkoni, ke ĝi devus unue *vekiĝi*, por trovi sian *Vivantan Dion*, „laŭ spirito kaj vero“, *en si mem*?

Servuta al la *ekstera mondo de la sonĝo*, ĝi serĉas „*ekster*“ si tion, kio estas trovebla por ĝi nur en la *interno* – pli ĝuste: nur en la *plejinterno* de la interno. –

En sia „*imago*“ ĝi metas sian propran internon ekster si, kaj ĝi kreas al si, en malproksimeco eĉ pli granda ol stela distanco, la bildon de „*dio*“ laŭ sia propra bildo, – de „*dio*“, kiu ŝuldas sian ekziston nur al homaj eraro kaj iluzio...

Deloge altira estas tia *sonĝo de la animoj*, kaj ĝi tenas ilin en dormo pli longe, ol kiom ili *devus* dormi.

Tro allogaj estas la multkoloraj bildoj de la sonĝo, tiel ke ili tenas en dormo ankaŭ *tiujn* animojn, kiuj jam *povus vekigi*, ĉar jam moviĝas en ili la *volo* al vekigo el la dormo...

Ne pli frue, ol kiam la *volo* al vekigo *vekas* la dormanton, li povas levi sin el la sonĝo kreita de li mem.

Se, simile al dormanto terurita de laŭta vekvoko, li ŝanceliĝante eligus sin el la dormo *antaŭ* sia tempo, li devus tuj *denove* subfali al dormo kaj sonĝo.

Ankaŭ en sia sonĝo la sopiro de la animo vere strebas al la *mondo de la realo*.

Sed facile estiĝas en ĝi la iluzio, ke ĝi mem estas *maldorma* kaj ke la *realo* estas *ŝonĝo*...

Kaj certe estas pli facile senti sin enŝonĝe proksima al, eĉ „unuigita“ kun, „dio“ kreita de oni mem, ol iri en maldorma sobreco la vojon, kiu estas trairebla nur en la *interno* kaj iam kondukas en la *plejinterno* de l' interno al la *celo*: – al la unuigito kun la *vivanta Dio*. –

Troviĝas profunde en la ebrio de l' ŝonĝo ankaŭ tiuj, kiuj rakontas, ke ili renkontis Dion en si kaj nun estas tute „*diiĝintaj*“...

Ili ŝonĝas *ekscititajn ŝonĝojn*, kaj ŝonĝante kredas esti *vek-iĝintaj*, ne suspektante, ke ilia „*diiĝo*“ estas nur *faro de ilia ŝonĝo*...

Ho ne, mia amiko, – kiam vi renkontos *la realan Dion* en vi mem kiel *vian vivantan Dion*, vi certe spertos lin nur *en vi mem* kaj sentos vin mem *unuigita kun li*, sed vi tute ne estos „*fariĝinta Dio*“ kaj mem „*diigita*“. – – –

Vi tiam vere estos ĉiutempe „en Dio“ kaj *vivas* en la eterna *vivo* de *Dio*, sed: – vi ne estas Dio, kaj eĉ post eterneco vi ne povas *fariĝi* „Dio“.

Vi povas sperti nur *vin mem en Dio* kaj *vian vivantan Dion en vi*, – *unuigita kun li en la konscio de spertado*, kaj tamen *ĉiam restanta tiu, kiu vi estas!* –

Sed Dio „spertas“ sin en vi „en *bildo*“, tiel, kiel Dio neniam povus sperti sin *en si mem*: – simile al la *suno*, kiu, sendante la radiojn de sia lumo tra enfokusiga lenso, kunigas ilin kaj en la fokuso estigas *lumon kaj fajron*...

Via *pensado*, mia amiko, igas vin *konkludi*: se Dio estas, tiam ankaŭ vi mem, – post *unuiĝo* kun Dio, – iam devus povi fariĝi „Dio“.

Sed via *pensado* estas *ligita al sonĝo*, kaj estas mem *parto* de via sonĝo.

Ho, ne opiniu esti proksima al *vekiĝo* tiom longe, kiom via *pensado* ankoraŭ aperas al vi kiel via plej hela lumo. Tie, kie via *pensado* estas *hejme*, ĝi faras al vi bonajn servojn, kaj estas malproksime de mi estimi malalte vian pensadon. Profunde sub la tero, en la mallumaj galerioj de minejo, mi certe *ŝatos lampon de ministo*. Sed kiel tia lampo tuj fariĝas malforta lumigilo, se la ministo ascendas kun ĝi en la tagan lumon kaj la blindige blankan helecon de la somera suno, tiel same ĉia *pensado* estas senpotenca, se ĝi arogas al si lumi en la spertadan helecon de la maldorma spirita *realo*...

Vi *utiligu* vian pensadon, kie ajn ĝi *povas* utili al vi, sed: – vi ne restu la *sonĝoligita sklavo* de via *pensado*! –

Sube en la labirinte mallumaj irejoj de la *tera* vivo vi certe ĉiam *bezonos* la lumigilon de via *pensado*, – sed ascendinte al la lumo de la *suno de l' spirito*, vi trankvile estingu la bruletantan flamon, kiu povas lumi nur en la malhelo. Ĉi tie ĉirkaŭradias vin *alia* lumo, kiun vi ne devas ekflamigi kaj gardi...

Vekiĝante vi ekkonos en tiu lumo vian malsaĝon, kiu volis deloge instigi vin: esplori sunradiojn per la lumo de oleolampo! –

Tre *diversaj* estas la sonĝoj de la animoj, kaj ne ĉiuj estas *same* foraj de maldorma spertado. –

Kiel sonoj de la ekstera mondo povas eniĝi en vian ĉiunoktan korpan dormon kaj, en formo sonĝe transformita, eniri en vian konscion, tiel same iu aŭ alia sono el regnoj de

en vian konscion, tiel same iu aŭ alia sono el regnoj de maldorma spirita spertado eksonas en kelkaj sonĝoj de la animoj...

La sonĝo tiam peras, *kvazaŭ de fore, antaŭsenton de vekiĝo*, sed tamen ĝi restas *sonĝo*.

Eble vi mem jam perceptis tiajn sonojn en la profunda dormo de via animo. –

Eble vi mem jam sentis, ke vi povas baldaŭ vekiĝi, kaj tamen vi denove subfalas al la dormo kaj ĝia sonĝo. –

Tiu sento tamen estu por vi signo, ke vi estas *proksima* al vekiĝo, kvankam apenaŭ tiom proksima, kiom vi deziras kredi.

Pli kaj pli penu, en via sonĝo kaj en ties memkontentiĝemo, *atenti* sonojn el la maldorma mondo de la spirito!

Eĉ se ili fariĝas kaptebla al vi nur en formo modifita laŭ la „tonalo“ de via sonĝo, ili tamen iom post iom faros vin pli kaj pli maldorma, ĝis ili fine kondukas vin al *beatiga vekiĝo*.

*Iom post iom* vi estu eltirata el la dormo kaj ĝia sonĝo! –

Vi ne vekiĝu kun *teruro*!

Oni ne volas trovi vin en konfuzo, kiam vi vekiĝas el via dumviva multkolora sonĝo.

Alie, eĉ via *vekiĝo* povus *malutili* al via animo. –

La superhela lumo de la spirito devas unue esti *tolerata*, antaŭ ol oni lernas *ami* ĝin. –

Vi povos toleri ĝin nur tiam, se vi eligis vin el la dormo vekiĝante *iom post iom*.

Sed se hodiaŭ vi ankoraŭ estas enprofundiĝinta en profunda dormo, sonĝante sonĝon, kiun atingas neniu sono el la maldorma mondo de la spirito, aŭ se tia sono ja estas *percep-*

*tebla* al vi, sed vi sentas ĝin kiel *ĝenon* por via *sonĝo*, tiam sciu, ke „via tempo“ estas ankoraŭ *fora*, ĉar vi ne povus eltirata el via dormo sen teruriĝi.

Eĉ se oni *povus* vekti vin, vi restus maldorma apenaŭ por *momentoj*, kaj tiam vi tuj ree fordonus vin al la dormo...

Mi povas konsili al vi nur, ke vi *malrapide kutimigu* vin al tiuj sonoj, kiuj nun ankoraŭ „ĝenas“ vin.

Ne *amu* tro multe vian *sonĝon*, kaj provu eltrovi, ĉu vi povas diri al vi, ke ankaŭ *via* tempo iam devas veni kaj ke ankaŭ *vi* iam *vekiĝu*. –

Tiam vi baldaŭ sentos, ke la sonoj el la maldorma mondo de l' *spirito* estas malpli ĝenaj, – via *sonĝo* fariĝos pli kaj pli *luma*, kaj fine vi pli kaj pli *proksimiĝos* al *vekiĝo*. – – –

Ne estas nura ludo per vortoj, ke mi komparas la *staton* de homo, kiu ankoraŭ ne vivas plenkonscie en la *spirito*, kun la *dormo*, kaj lian *mondon de imago* kun la *sonĝo*! –

Mi parolas al teraj homoj kaj devas teni min je terhomaj komparoj.

Kiu ajn legos ĉi tiujn vortojn, tiu ankaŭ konas dormon kaj *sonĝon*.

Ŝajnus al vi tre malsaĝa ĉiu, kiu dirus al vi, ke nur en *dormo* li estas en la vera *vivo* kaj nur la *sonĝo* estas por li la *tera* realo; tiel same vi lernu ekkoni, ke tiu ĉi *tera vivo* tute ne ampleksas la *plej altan* realon: – ke ĉio, kion vi ĉi tie nomas „travivaĵo“ kaj „ekkonado“ restas fore malantaŭ la *spertado* kaj *ekkonado*, kiuj doniĝos al vi en la mondo de la *eterna spirito*, kiam vi estos mem *enirinta* en la mondon de la *spirito*, *eĉ se vi ankoraŭ vivas en la fiziksense perceptebla korpo de tera homo*.

Bone estas al vi, se vi scias, ke vi estas *sur la vojo*, kiu *en vi mem* kondukas vin al *maldorma spertado* de la *spirito*. – –

Bone estas al vi, se vi almenaŭ ekkonas, ke tiu ĉi vojo estas preparita ankaŭ *por vi*. – –

Eĉ se vi eble sentas vin ankoraŭ malproksima de la komenco de tiu ĉi vojo, tamen la nura *scio* pri la vojo donos al vi la *forton* por *trovi* ĝin, venkante ĉiun obstaklon, – kaj se vi scias, ke vi jam *ekiris* sur ĝin, vi scias ankaŭ, ke vi devas nur iri plu firmapaŝe, por trovi *Dion* en *vi mem*. –

## VERO KAJ REALO

Kion vi, en la regnoj de via *imago*, trovas tiom firme *bazita*, ke neniŭ atako de via pensado *iam povus renversi* ĝin, tion vi nomas „*vera*“. Sed vi rigardas kiel „*veran*“ ankaŭ pli ol unu imagaĵon, kiun vi nur *hodiaŭ* kaj per *viaj* kapabloj ne povas faligi, tiel ke *poste*, kiam *aliuloj* faligis ĝin, ankaŭ vi ne plu povas rigardi ĝin kiel veraĵon. – –

Tiel okazis, ke ĉiu el la intersekvantaj generacioj gardis sian *propran* veron kvazaŭ *juvelon*, kiun ĝi provis konservi plej zorge por la sekvanta generacio, sed tiu heredaĵo ŝajnis al la posteuloj posedi apenaŭ la valoron de infanludiloj...

Kaj tamen la „*vero*“ retenis sian altan „*kurzon*“ ĝis la hodiaŭa tago, kvankam ofte sugestiĝis la demando: *kio do en la koncerna tempo estu rigardata kiel vero?*

Se nun *tie ĉi* estu parolate pri la „*vero*“, ni volas *konscie lasi flanke* tion, kio dum la pasinteco estis rigardata kiel „*vero*“.

Estu nun parolate pri „*vero*“ nur en tiu senco, ke ĉiu generacio havis, *krom* sia tempe tre limigita *opinio*, *veron* kiu ne povis senvalorigata de posteuloj.

*Vero* en tiu senco ekzemple estas, ke homaj *ekkonoj* atingeblaj per *pensado* ĉiam restas *fragmentaĵoj*, kaj ke same ĉia *potenco* de l' homo super la naturo – malgraŭ ĉiuj venkoj super naturaj fortoj – tre baldaŭ devas rezigne akcepti certajn *limojn*, kiujn ĝi tute ne mem metis al si. –



El tiu vero la *pensado konkludis*, ke la regionoj de *ekkondado* kaj de *potenco*, kiuj estas *neatingeblaj al homoj*, estas metitaj sub la senlima potenco de *alia volo*. Sed tiu nura *konkludo* estigas imagaĵon, kiu tro facile povas esti *renversata*, ĉar mankas al ĝi la *fundamentoj*, sur kiuj baziĝas tiu *vero*, el kiu oni tiris la konkludon...

Eĉ se *pensado* kaj *konkludado* kreas imagojn rigardeblajn kiel la plej bona *parabola komparaĵo* de la vero, – la vero mem, pri kiu estas la parolo *ĉi tie*, estos *neniam* elpensebla aŭ konkludebla. –

Fina *vero* estas *tre alte super* ĉia *pensado* kaj restas *eterne* neatingebla al la *pensado*, escepte se la homo renkontas en si la *realon* kaj en reala *spertado* interne ekkonas tion, kion li serĉas, por *tiam prezenti* ĝin al sia *pensado* kiel donon. – – –

Sennombrajn fojojn oni *elpensis* al si „Dion“ kaj kredis esti *trovinta* la Diecon *en pensado*.

Sed eĉ en la plej sublima *pensado* oni nur starigis *idolon* laŭ la modelo de l' *homo*: – *imagaĵon*, kiu ekzistas, kiel sense–nesense perceptebla fantomo, sole nur *en la imago de homaj cerboj*...

Vere, estas facile kompreneble, ke *neniam* mankis homoj, kiuj rifuzis kredi je tia „Dio“, – sed estas preskaŭ nekompreneble, ke miraĝa iluzio tiel elpensita ĉiam denove trovis kredantojn, kiuj sin klinis antaŭ ĝi. – –

Ekzistis en ĉiu tempo nur tre malmultaj homoj, kiuj ĉi tie nek kredas nek rifuzas kredi, sed *tute forturnis sin de la elpensita idolo*, por *sperti* en si sian *vivantian Dion* en ties *realeco*.

Kio tiel estas spertata, tio ja superas ĉiun *imagon*.

Neniu *imagaĵo* estas kreebla, kiu egalus ĉi *tion spertatan*. Ĝi ne estas prezentebla per iu *penso* nek komunikebla per iu *vorto*.

*Nur tiu spertanta mem* scias pri ĝi, kaj li scias – sole per *tio spertata* – ke li vere spertas *tion*, kio ne nur portas la *nomon*, kvazaŭ ĝi estus „Dio“, sed kio estas *Dieco en si mem de eterne ĝis eterne...*

Tie ĉi la *dubo*, kiu rongâs eĉ la plej subliman ekkonon de la *pensado*, por ĉiam *perdis ĉian potencon!* *Tiu spertado estas interna ekkonado de la plej interna vivofundo en la propra „mi“*. – – –

Kiel lumo, ekflamigita en multkolora lampo, montras la *kolorojn* de la buntaj vitroj kaj tamen *ne mem koloriĝas* interne de la lampo, tiel same la *Dieco* eniras en la *plejinternon de la homo*, – montriĝas en li laŭ ties individua naturo, kaj tamen restas tio, kio ĝi eterne estis kaj estas. –

En tiu *realo* estante intime unuigita kun sia prafundo, la tera konscio de la homo nur nun ekkonas la *realan* veron kaj la *realon* de tiu eterna vero.

Nur nun li ekkonscias, kio Dio *estas* laŭ *vero* kaj *realo!* – Nun ĉiuj antaŭaj *imagaĵoj* pri Dio falas en grizan mallumon. Kiu tiel *spertas en si* la Diecon kaj *sian propran realecon* en ĝi, tiu vere ne plu bezonas bildon kaj parabolon, kaj nur se li volas instrui *aliulojn*, li devas krei al si bildon kaj parabolon por la *aliaj*, por ke lia vorto povu vekti ilian internan *sentaĉdon*.

Lia parolado tamen devas resti *balbutado* kaj *mallerta interpretado*, eĉ se li provas sciigi aliajn pri sia spertado per ĉiaj bildoj de la lingvo...

Nur *tiu*, kiu tiamaniere spertis sian *vivantan Dion* en si, *scias* pri Dio per *scio certa*, same kiel *sole* li nun *scias* pri *si mem* per *scio certa!* — — —

Sed eĉ tiu ĉi alta ŝtupo estas nur *antaŭkondiĉo* por ĉiu *plua disvolviĝo* en la spirita mondo, kvankam en ĉiuj tempoj nur malmultaj homoj dum sia vivo atingis ĉi *tiun* ŝtupon, aŭ eĉ transpaŝis ĝin.

Estas *krimo* paroli pri Dio, eĉ per la plej belaj vortoj, se la parolanto ne *scias* kun plena certeco, ke liaj piedoj staras sur *tiu ĉi* ŝtupo.

Sed se li atingis ĝin, li *scias* ankaŭ, ĉu li vere estas *vokita* al *instruado*, kaj nur *vokito ne profanos* la nomon de Dio.

Estos „donata“ al li tio, kion li parolu, de tiuj, kiuj ricevis *pli* ol li, ĉar ili estis trovataj jam antaŭ jarmiloj sur la vojo, sur kiun li ekiras nur en la hodiaŭa tago. —

Estas *neeble*, sperti sian *vivantan Dion* en si mem, sen *konscii la gvidadon fare de la pli aĝaj homaj fratoj el la spirito...*

*Ankaŭ ili* devis iam ekiri la vojon sub tia gvidado, ĝis ili trovis en si mem la unuigon kun sia *vivanta Dio*.

Sed oni postulis *multe pli* de ili, kiuj estis fariĝontaj *helpantoj* de ĉiuj homaj animoj noktoĉirkaŭitaj...

*Multe pli peza ŝarĝo* estis metata sur ili...

Tiel oni kapabligis ilin *jam dum ilia surtera vivo*, eniri *plenkonscie kaj maldorme en la mondon de la spirito*, — en la mondon de la *reale estanta spirito*, kiu estis ilia *hejmo* kaj ki-

un ili *konis*, longe *antaŭ* ol ili surtere ricevis sian terhoman korpon.

Kion iu aŭ alia malnova *legendo*, kiun vi ĝis nun mokridis kiel „malsaĝaĵon“, eble havas – nun ke vi scias pri tiuj aferoj – por diri al vi, kvankam en mallumaj vortoj, tio estu lasata al via propra esploro. –

Mi povas diri al vi nur, ke mi parolas *el plej certa certeco*, estante homo, kiu scias paroli nur pri aferoj, kiujn li mem spertis. –

Se vi volas iam veni al *spertado de via vivanta Dio* en vi, vi *ne devos eviti* la helpon de viaj fratoj jam vivantaj en la *spirito*, kiel evitas ĝin ĉiu, kiu ja esploras ĉiun altaĵon kaj trafosas ĉiun profundaĵon por trovi Dion, sed restas ligita al sia fierego, kiu konstante flustras al li: ke li *ne bezonas spirithoman* helpon.

Se vi volas renkonti en vi mem la *realon*, vi *devos estimi kaj atenti* tion, *kion la realo ekzistigis*.

La demandon, *kiumaniere* vi konsciiĝu pri Dio, devas decidi *ne vi*, sed: – *Dio!* – – –

Se vi ricevas la spirithoman helpon, pri kiu mi parolas, vi ricevas *ne homan*, sed *Dian helpon*, kiu uzas homon por helpi alian homon, ĉar aliamaniere li, en sia animaleco, *neniam povus ricevi helpon de Dio*. –

Tie ĉi oni certe ne postulas de vi „kredo“, kvazaŭ vi kredu miajn vortojn *pro la vortoj*. Mi diras al vi nur, kio estas *nepre necesa*, se vi volas fariĝi el serĉanto: *trovinto*.

Oni postulas de vi *ne pli*, ol ke vi *ne obstine rezistu* la helpon, kiu povas atingi vin *spiritavoje* – kaj *nur* spiritavoje. Ĉu

miaj vortoj meritas „kredon“, demandu *tiujn*, kiuj *agas* laŭ ili, – kaj tiam provu *mem*, ĉu vi povas konfirmi ilin.

Mi volas ne alporti al vi „*novan kredon*“, sed konduki vian animon al *certeco*: – al tiu *vero*, kiu estas spertebla nur kiel *realo*. – –

Vi povos *koncentri* kaj *unuigi* la elementojn de via animo nur tiam, se donas forton al vi la *fluegoj de spirita vivo*, kiujn kondukas en la teran nokton *tiuj*, kiuj *agas* el la *esenca spirito*, ĉar ili *devas* agi tiel. –

*Ili mem estas nur instrumentoj de la Dia volo.*

Vi povas ricevi ne *iliajn* fortojn, sed sole la forton de la *spirito*, el kiu forto ili vivas en la maldorma mondo de la *spirito*. Ili estas *transformantoj* de la forto de l' *spirito*, *kio alie ne povus fariĝi sentebla al vi en la teranimala mallumo...*

Ili ne kredas esti io „*pli alta*“ ol vi, ĉar ĉion, *kio ili eble iam kredis esti, ili dissolvis en tio, el kio ili estas...*

Se ĉi tiun *estadon* vi sentas *superordigita* al vi, vi sciu, ke *ankaŭ ili* sentas ĝin *superordigita* al ĉio, kion ili kiel teraj homoj iam rigardis kiel *atingeblan* aŭ *dezirindan*. Ili vere ne *avidas dankon* pro sia helpo, kaj ilia tuta „*helpado*“ baziĝas nur *en ilia esto*.

Ili tute ne povus alporti al vi helpon *alian* ol tiun, kiun vi *bezonas*, se vi volas *atingi en vi vian vivantan Dion*. Se vi eble ricevas *spiritan helpon* ankaŭ en *aliaj aferoj*, tiam *ne atribuu ĝin al viaj helpantaj fratoj sur la tero!* –

Vere, ekzistas en la regno de la *spirito* ankoraŭ *alia helpo*, kiun ankaŭ *ili*, en sia *surtera vivo*, ofte treege bezonas. – –

*Estante nek „superhomoj“ nek sorĉistoj*, ili estas *elmetitaj* en sia *tera vivo al ĉiuj teraj mizeroj en tute sama maniero kiel*

vi, kaj ili ekkonas la agadon de *alta saĝo* en tio, ke ili tie ĉi devas en ĉiu rilato porti la terhoman sorton...

Kiel ili povus savi el tenebro – per ama disfluigado de ĉiom de la spirita forto enfluanta en ilin – la animojn tie ĉi vivantajn en mallumo, se la mizeroj de la tera homo estus *fremdaj* al ili?

*Per ilia ekkonado de la tuta homa mizero ja estas transformata la forto de la spirito tiel, ke ĝi entute fariĝas sentebla kaj kaptebla al la animoj en la formo de la helpo, kiun ili bezonas sur sia vojo al Dio! – –*

Vi vere povas konfidi vin al ili, precipe ĉar oni postulas de vi nenion alian, ol ke vi gardu vin, ke vi ne *obstine rifuzu* ilian helpon.

Alie via *volo*, kiu eksteriĝas en tia obstinado, estus obstaklo al la helpo.

Sed se vi *volas* kaj estas *preta* ricevi helpon, ĝi doniĝos al vi sur via vojo *sen voko kaj peto*. Tiu ĉi helpo ne estas konfidita al *la arbitro de la helpanto!*

Vi devas esti trovata, se vi *volas* lasi vin trovi!

Tiam vi kun plena certeco trovos la *veron*, kiun vi ĝis nun tiom ofte serĉis *vane*.

Tiam vi ekkonos tion, kion miaj vortoj ree kaj ree celas proksimigi al via animo: – ke tiu ĉi *vero* estas trovata nur kiel *realo*. –

## JES KAJ NE

Vi ne povas esperi trovi vian vojon al Dio, se vi ne metas *netuŝeble sekurajn limojn* al viaj „jes“ kaj „ne“ en *via surtera vivo*.

Viaj „jes“ kaj „ne“ ne devas direktiĝi laŭ la ŝanĝiĝemaj celoj de viaj *deziroj*.

Eĉ malpli devas la teranimala potenco de viaj *instinktoj* decidi, kie vi diru „jes“ kaj kie „ne“. –

De via *decideco* dependas la *decido pri via sorto*, kaj *sole vi* devos elporti vian sorton. –

Tuj kiam vi *decidis* eligi vin el la *ŝajno* por atingi la maldorman *eston*, ĉio volanta delogi vin al tio, ke vi *ŝajnu* io alia ol kio vi *estas*, devos ĉiam renkonti vian „ne“.

Tuj kiam vi *decidis* iri *la vojon al Dio*, via „jes“ ne plu devos apogi ion, kio povus malhelpi vin strebi en vi mem al *la plej alta alto de via animo*. –

Viaj „jes“ kaj „ne“ kapablas firmigi vian *volon*, tiel ke ĝi staras kvazaŭ roko en la impetaj ondegtoj de ĉia ekstera okazaĵo. –

Ĝis nun vi eble kutimis preni vian „jes“ aŭ „ne“ ne tro grave? –

Depende de viaj *deziroj* via „ne“ sufiĉe rapide fariĝis „jes“, kaj via „jes“ – „ne“...

Kaj tio estis neevitebla, ĉar vi maltrankvile serĉis ĉiuloke kaj ne povis trovi tiun unu vojon, kiun celis via tuta serĉado.

Sed nun la vojo estas *montrata* al vi, kaj via vaganta serĉado finiĝis.

Nun vere malmulto estos same grava por vi, kiel viaj „jes“ kaj „ne“. —

Vi devos *difini* vin, tiel ke ekde tiu ĉi tago via „jes“ estu *neŝancebla* „jes“, kaj via „ne“ *nekoruptebla* „ne“!

Antaŭ ol vi *difinas* vin mem rilate al tiaj „jes“ kaj „ne“, vi devos zorge elekti, *kio* ricevu vian „jes“ kaj *kie* validu via „ne“...

Sed tiam viaj „jes“ kaj „ne“ ne plu estu influeblaj de iu potenco sur la tero.

Eĉ kiam vi eble *eraras* en tiu memdifino, via eraro signifos nur malmulte, se ĝi estis difinata de la *volo atingi vian plej altan alton*. —

Nur *nedifiniteco* estas malbona, nur *nedeciditeco* estas pe-reiga!

Vidu, ankaŭ en estonta tempo ofte ne mankos al vi kaŭzoj por deziri, ke viaj „jes“ kaj „ne“, kiuj difinas vin, estu *interŝanĝeblaj*, kaj kelkfoje vi ankaŭ ŝatus fuĝi en *nedifinitecon*. —

Tial konsideru saĝe *antaŭ* ol difini vin, ĉar ĉiu tago *metas al vi sian demandon pri viaj „jes“ kaj „ne“*, kaj la demando de ĉiu tago estos decidata per via *konstanta „jes“* — per via *konstanta „ne“*. —

Kiel vi difinis vin mem tie, kie temas pri *via memdifiniteco* por *ĉiuj tempoj*, tiel same vi devos ankaŭ difini viajn „jes“ kaj „ne“ tago post tago en *ĉiuj aferoj* de tiu ĉi surtera vivo, *estante fidela al vi mem*. —



Vi ne povas esperi atingi vian plej altan alton en vi mem, se vi ne *scias*, kie estu via „jes“ kaj kie via „ne“.

Vi ne povas esperi atingi vian plej altan alton, se via „jes“ ankoraŭ sin dungigas al la *teranimala sento de agrableco*, kiam nur via „ne“ povus eligi vin el la profundo...

En horo de kontemplado demandu vin tre strikte, kio ĝis nun ricevis vian „jes“ kaj kio vian „ne“. –

Sed ankaŭ demandu vin, kie vi ĝis nun restis en *nedeciditeco* por ĉiam povi decidi, laŭ viaj mallumaj avidoj, *jen favore al „jes“, jen favore al „ne“*.

Ne terurigu, se vi devas vidi, ke la plej granda parto de via domo baziĝas sur ŝanceliĝanta grundo!

Vi ja *esploru* la grundon, sur kiu la fundamentoj baziĝas, por ke vi ĉie povu *firmigi* ĝin per novaj fortikaj fostoj!

Sed ni tie ĉi povas lasi flanke ĉiun metaforon.

Temas pri tio, ke vi atingu *deciditecon de via volo*, per kiu ekde nun estu decidate, kio ricevu vian „jes“, aŭ per via „ne“ estu forigata el via vivo.

Temas tute ne pri „*jesado* aŭ *neado de la mondo*“, sed pri *via limigita surtera vivo kaj la formo*, en kiu vi ĝin vivu!

Vi difinu vin mem por vivi ĝin *tiel*, ke ĉio, kio povas *levi* vin en vi mem al *lumo kaj puriĝo*, certe ricevas vian „jes“, kaj ke ĉio, kio eble povus *tiri vin malsupren*, renkontu ĉiam *kun plena certeco* vian „ne“. – –

Kiam *vi mem* estas difinita, ĉiu decido, kiun vi devas fari, „*per si mem*“ trovos difinitecon en la *sama* maniero.

Viaj „jes“ kaj „ne“ en la *ĉiutaga vivo* estos nur respegulaĵo de tio, kio *en vi mem* ricevis vian „jes“ kaj kio devis kliniĝi al via „ne“.

Tial zorgu, ke vi *en vi mem* sekurigu viajn „jes“ kaj „ne“!

Ĉi tie, ĉiu *alia* zorgado estas malutila.

Eĉ kiam vi estas *difinita* en vi mem, tiel ke plu nenio ekstera povas difini vin, vi tamen ne devos *rigidiĝi*.

*Hodiaŭ* povas meriti vian „jes“ decido, kiun vi *morgaŭ* devas respondi per via „ne“...

*Hodiaŭ* via „ne“ povas savi vin el la profundo, kie *morgaŭ* sole via „jes“ kondukos vin pli alten...

Via propra *kreskado* tre ofte *postulos* de vi, ke vi faru decidon jen per „jes“, jen per „ne“.

Sed se vi estas definitive *difinita en vi mem*, tia *ŝanĝo* tamen ĉiam signifos *persistadon*.

Malgraŭ ĉiu ŝanĝo, vi ĉiam *persistos* en viaj *propraj* „jes“ kaj „ne“ *en vi mem*, kaj kiel ajn vi decidis en iu okazo, vi ĉiam decidis nur laŭ *via konstanta difiniteco*. –

Laŭ la *ekstera aspekto* vi hodiaŭ povas decidi *alie* ol hieraŭ, ĉar la *eksteraj* cirkonstancoj *aliĝis*, sed *eĉ en ŝanĝigo* viaj „jes“ kaj „ne“ devas esti *difinitaj* nur de *vi mem*: – per via *memdifiniteco*, kiun vi donis al vi *por ĉiam*, kiam vi starigis neŝanĝeble firmajn limojn al *viaj ĉion difinantaj* „jes“ kaj „ne“. – –

Ne estas allaseble, ke, trompante vin mem, vi diras hodiaŭ „jes“, sed morgaŭ „ne“ nur tial, ke la *inklino al via propra agrablo* aŭ *viaj deziroj* volas persvadi vin, ke vi ŝanĝu la decidon!

Nek devas ŝanĝi vian decidon la „jes“ aŭ „ne“ de *alia homo*, tuj kiam vi *difinis* vin en vi mem tiel, kiel via alta celo *postulas*.

Kiu volas sperti en sia surtera vivo nur sian *teran animalon*, tiu diros „jes“ kaj „ne“ al *aliaj aferoj* ol homo, kiu dezi-

ras utiligi la surteran ekziston por tie ĉi atingi la plej altan saĝon, kiun lia *pensado* povas havigi al li.

Kaj ankoraŭ aliaj estos la „jes“ kaj „ne“ de malsaĝulo, *kiu servas al idolo kreita de li mem.* –

Sed vi, kiu volas trovi kaj ekiri *la vojon al Dio*, devos difini en vi tiajn „jes“ kaj „ne“, kiaj estas *indaj* je tiu alta celo.

En tio, la „jes“ kaj „ne“ de *aliuloj* ne povas helpi vin, eĉ se temas pri aliuloj, kiujn vi alte estimas, – escepte se *ili trovis* tie, kie vi ankoraŭ *serĉas*, kaj do kapablas diri al vi, *kiel vi difinu* viajn „jes“ kaj „ne“ *en vi*, por ke vi iam povu *atingi vian celon*, same kiel ili atingis la sian. – –

Tre *malmultaj* estas la homoj, kies „jes“ kaj „ne“ povas tiamaniere *helpi* vin!

Multe pli granda estas la nombro de tiuj, kiuj provas *decidi vin* laŭ sia naturo, kvankam ankoraŭ *mankas* al ili *ĉia memdifiniteco*, ĉu en bona, ĉu en malaprobinda senco. –

Ili estas la *plej granda* danĝero por vi, ĉar ilia propra *nedifiniteco* ne *evidentiĝas* al vi...

Vi devos eviti ilin *eĉ pli* ol ĉiujn, kiuj *moke ridas* pri via alta celo, tial ke ilia *malalta* difiniteco konas kaj agnoskas nur ion *malaltan*.

Tie, kie la „jes“ de *aliulo* kun klara difiniteco konformas al *via „ne“*, vi ne bezonas ion timi, same kiel tie, kie la „jes“ de aliulo konformas, kiom estas eble, al *via „jes“*, kaj lia „ne“ al *via „ne“*.

*Sed gardu vin kontraŭ ĉiu, kiu ĉiam parolas por via plaĉo!*

Gardu vin kontraŭ ĉiu, kiu komence direktas sian paroladon al „ne“ kaj, kiam li vidas, ke vi atendis „jes“, tuj finas ĝin per „jes“!

Gardu vin kontraŭ ĉiu, kiu ĉiutempe povas interŝanĝi „jes“ por „ne“, kaj „ne“ por „jes“!

Sed gardu vin ankaŭ kontraŭ la inklino *trudi* vian *propran* „jes“ aŭ „ne“ al aliulo!

Kian vi *difinis vin*, tia estu nur *vi mem*, eĉ se aliaj certe povas fariĝi *similaj* al vi.

Vi povas difini nur *vin mem* kaj *ne* la *eksteran mondon*!

Se vi tamen provas fari tion, kaj tiel *etendas vian manon ekster* vian sferon, vi etendas ĝin *en vakuon*, eĉ se vi deziras persvadi vin, ke vi difinis ankaŭ aliajn.

Vi certe povas *delogi* aliajn al transpreno de viaj „jes“ kaj „ne“, se ili estas ankoraŭ *nedifinitaj* en si mem, – sed se vi opinias, ke rezulte ili *estus trovintaj difinitecon en si mem*, vi estus subfalinta al malsaĝa, vanta iluzio...

Sed tre diferenca de tia iluzio estas via scio pri la maniero, en kiu vi – ĉu vi volas aŭ ne – *el via interno* konstante *kundifinas* la aliajn per via propra difiniteco. –

Vi ne povas tute *izoli* vin en via ekzistado, eĉ se vi irus en la dezerton, aŭ konstruus al vi kabanon en la plej profunda praarbaro.

Eĉ se vi ekde hodiaŭ vidas plu nenium homon, vi tamen restas intime ligita kun la homoj.

*Per nevideblaj osciloj*, kiuj estas la ĉiam fidelaj senditoj de viaj pensado, sentado kaj spertado, vi restas *intime ligita, eĉ en la plej granda malproksimeco*, kun ĉiuj homoj kies interna naturo estas *simila al la via*, kaj vi konstante ricevas *de ili* mesaĝojn en la *sama* maniero...

Vi eble tion ankoraŭ *ne konscias*, sed ĉu vi scias pri tio aŭ ne: tiu konstanta okazado neniam estos ŝanĝebla. –

*Tiel sin helpas reciproke ĉiuj, kiuj estas sur la samaj vojoj.*

Tiel ankaŭ vi helpos la *aliajn*, kiuj volas difini sin mem, se vi *difinas vin en vi mem*. –

Tiel viaj *propraj* „jes“ kaj „ne“ helpos *aliajn trovi siajn* „jes“ kaj „ne“. – – –

## LA GRANDA Batalo

Ke vi ankoraŭ ne *trovis* en vi vian *Dion* kaj unuiĝis kun la *Vivanto* en lia *lumo*, estu al vi sufiĉa pruvo de tio, ke vi ankoraŭ staras sub la potenco de *aliulo*, kiu estas *ne* via Dio kaj *ne* vi mem...

Vi estas ligita per terura ligo, kaj nur en severa batalo vi povos liberigi vin el tiu ligo. – –

Sed antaŭe vi devas ekkoni, *kiu estas tiu*, kun kiu vi devas batali.

Tiu tenanta vin *en nevideblaj ligiloj* estas mem *nevidebla*, kaj li volonte lasas sin adori de vi kiel „dion“ kaj alporti al si oferojn. Vi povas *senti* lin, kvankam vi neniam povos lin esplori.

Li vere *ne* estas „idolo kreita de vi mem“, kaj sian potencon li *ne* ricevas el via kredo.

Li ankaŭ ne estas, kiel malnovaj kredinstruoj asertas, la „malamiko“ kaj kontraŭulo de Dio, ĉar li *scias nenion pri Dio*, kaj ĉia kredo je Dio estas por li homa malsaĝo.

Se li vidas homon sopiri pri *Dio*, li estas certa, ke *nur li mem* estas „dio“, kaj rigardas *sin mem* kiel tiun sopire serĉantan; – sed kiam li ekkonas, ke la homo reale komencas serĉi vojon, sur kiu li *povus liberigi sin de liaj katenoj*, li fariĝas la terura malamiko de la homo kaj provas neniigi lian surteran vivon...

Se kontraŭ *lia* potenco ne estus starigitaj limoj *pli potencaj*, vere neniu el la teraj homoj povus iam atingi *Dion dum tiu ĉi surtera vivo*. – –

Unu el tiuj, kiuj *liberiĝis* el la fortikaj katenoj de tiu nevidebla reganto, parolis al vi pri li, nomante lin „*estro de la mallumo*“, – sed vi ne sciis, pri kiu li parolis, kaj eĉ hodiaŭ ne scias...

Se oni ne preferis preni la vorton nur *simbole*, oni kreis en sia imago terurilon por infanoj, al kiu oni rilatigis tiun vorton...

Sed *tiu*, kiun celis la klara parolo de la alta majstro pri „la estro de la mallumo“, vere estas „*estro*“ *de la kosma nokto*, kvankam la homo, kiu unuafoje nomis lin tiel, tre malpliigis lian potencon. – –

Tie ĉi temas pri *reala estaĵo* en la nevidebla fizika kosmo, al kiu ĉio sur la tero – kiom ĝi havas *teran* naturon – restas *tere subordigita*, ĝis tiu estaĵo mem iam *disfalos* kune kun tiu ĉi planedo: – dissolviĝos en *nekonscian kosman* forton. – – –

Kun via *teranimaleco* – kiu ampleksas ankaŭ vian *pensadon* kaj ĉiom de la *mekanikaj* faraĵoj, kiujn la tera homo iam kreis kaj kreos – vi estas plene sub la potenco de tiu estaĵo.

Ĝi estas la „*estro de la tera naturo*“ kaj do ankaŭ estro de *via teranimaleco*, tiel ke vi vere povus adori ĝin kiel „*dion*“, se vi ne krome estus *io alia* ol tiu ĉi tera animalo. – – –

Nur ĉar vi krome estas *io alia ol naskitaĵo de la tero*, vi povas *forsavi* vin de li, kaj *levi* vin, *kiom vi estas nepereonta*, super lin, la pereonton. –

Tamen vi, *laŭ via teranimaleco*, ankoraŭ staros sub lia regado, sed estante iu, kiu estas ne plu *absolute* subigita al lia potenco, eĉ se li kelkfoje devas amare senti ĝin. —

Estas tre granda entrepreno deklari batalon al tiu *potenculo de la kosmo*. —

*Pli ol homa „kuraĝo“ estas bezonata por batali kun li.* —

Kaj tamen vi devos *komenci* kaj *trapasi* ĉi tiun batalon, kiu *finiĝas nur tiam*, kiam la *tera animalo*, en kiu vi vivas, *malligiĝas* de vi, la *nepereonto*. — —

Pli ol unu restis sur la batalkampo, kiuj grandgeste aŭdacis batali tiun batalon kaj ne sciis, kun kiu ili luktis...

Ankaŭ *tie ĉi* vi bezonas *altan helpon*, se vi volas resti *venkanta*, dum vi ankoraŭ vivas sur la tero. —

La batalkampo estas tute ne *nur en vi mem*.

Ankaŭ de *ekstere* estas kondukata kontraŭ vi *severa batalo*, kaj vi devos konstante montri vin provita en nura *defendado*, ĉar la *viaflanka komenco* de la batalo povas esti neniam *atako*, sed nur *rifuzo* direktita al la *estro de la tera animalo*, kiu animalo nun fariĝu al vi *tera instrumento*, dum antaŭe vi subordigis al li *vin*, la *nepereonton*.

Neniam la *estro de la malluma materio* *volonte cedos* al vi ion, kio staras sub lia *regado* kaj kion vi tamen devos *servigi* al *via volo*, se vi volas atingi vian *Dion en vi mem jam dum tiu ĉi surtera vivo*. — —

Li ankaŭ neniam „*komprenos*“ vian faradon, escepte kiel *arogantecon*, ĉar ĉio *spirita*, do ankaŭ via *Dio*, estas al li fantaziaĵo de la *sola* el ĉiuj naskitaĵoj de tiu ĉi tero, starantaj sub lia potenco, kiu malgraŭ ĉio aperas „*fremda*“ al li.

*Li mem neniam prezentos sin por batalo.*



Por tio li multe tro *malestimas* vin. Ankaŭ en la *batalo* li restos la „*estro*“ de via tera animalo kaj igos sole *siajn servutulojn* kontraŭbatali vin...

La batalo do okazas inter tre *malegalaj* partioj, ĉar ĉiam *unu* devas batali kontraŭ *multaj*, – kaj inter tiuj multaj estas multaj, el kiuj *ĉiu unuopa* estus multe supera al li, se li ne estus ĉiam denove fortigata *per altaj fortoj de la spirito*.

Estas tago riĉa je konsekvencoj, en kiu via interno ekribelas kontraŭ la potenco de tiu nevidebla estro – kiun obeas ne nur lia propra sekvantaro, sed ankaŭ tiuj profunde malleviĝintaj, kiuj iam, estante „majstroj“, falis el la *alta lumado* – kaj decidis rifuzi por ĉiam obeon al li.

Unue eble ŝajnas al vi, ke temas pri infana komedio, kiun vi preparas al vi mem, sen ia efiko en la nevideblaj kosmaj regionoj.

Sed baldaŭ vi *ŝanĝos* vian opinion, kaj vi vidos tre klare, kontraŭ *kiu* vi staras en batalo...

Sed kio ajn renkontos vin: – *ne perdu la kuraĝon*, kaj sciuj, ke *alta helpo* estas proksima al vi, – *eĉ tiam*, kiam vi eble kredas, ke via *malvenko estas certa*. – –

Vi *ne povos* malvenki, tiom longe, kiom vi bazas vian *konfidon al la venko ekskluzive sur la forto de l' spirito*.

Kiu tie ĉi *malvenkis*, estis tro certa pri sia *propra* forto, tiel ke la helpo venanta el la forto de l' *spirito ne povis partopreni* en la batalo.

Nur tiam, kiam vi lasas la forton de l' *spirito partopreni* en via batalo, ĝi *batalos por vi*...

Apartenas *ne al la plej malbonaj* kaj *ne al la malkuraĝaj* tiu, kiu ne deziras koncedi tiun *partumon* en la batalo.

Ne ĉiam temas pri *fierego*, se homo kredas, ke la batalo estas decidebla sole per lia *propra* forto.

Sed ĉiam temas pri malvasta homa *erarado*, se homo kredas esti kapabla batale atingi la venkon *sen* spirita helpo. –

Oni tiam ne *povas* helpi lin, eĉ se li urĝe *bezonas* spiritan helpon, ĉar per sia tuta *farado* li *rifuzas* la helpon, kiu volas batali por li ĝis la fino de l' batalo...

Kiu volas, ke la *venko* estu *atingata* por li, tiu neniam volu atingi ĝin per sia *propra* forto!

Li devas danke *akcepti* la venkon, kiun la alta forto de l' *spirito* atingis por li. – –

Ĉiam li devas konscii en si mem, ke tio, kion oni flanke de la spirito postulas de *li*, estas *nur* lia *volo* batali ĉi tiun batalon, sed ke tiu ĉi batalo *povas* esti decidata *sole nur fare de la spirito*...

Kiu opinias, ke la venko estas atingebla per lia *propra* forto, tiu ankoraŭ ne scias, kio estas la *premio de l' batalo*: – tiu tute ne scias, ke finfine temas pri tio, ke *io tera* estu *liberigata* el tera ligiteco, por ke ĝi povu *unuiĝi kun la spirito*.

Certe: eĉ tiam, post kiam la venko estas atingita fare de spirita forto, vi devos, kun via teranimala naturo, resti en la servo de la „*estro de ĉi tiu mondo*“, dum vi vivas sur la tero, – sed nur tio, kio iam *forputros*, restas en lia servuteco.

Sed tio, kio *krom* tiu substanco *malkomponiĝonta* apartenas al vi kiel tera homo – kiel ajn vi nomas ĝin –, estos *via propraĵo* ankaŭ *post* la morto de via korpo, kaj *restos* via propraĵo, – unuiĝita kun vi, la nepereonto, – *por ĉiam kaj eterne*...

Iru do *sekure* kaj *konfidante* en ĉi tiun batalon, en kiu vi povas venki nur kun la forto de l' spirito, *per defendado!*

Vi *certe* atingos la venkon, kondiĉe ke vi lasas la forton de l' spirito *partopreni* en via batalo.

Tie ĉi vi ja *faru* tion vian, – sed „*tio via*“ ĉiam estas nur: *forturniĝo* for de la kosma potenco de l' tera demono, kaj via *firma volo* defendi vin kontraŭ lin – *konstante, en ĉiu momento de via plua surtera vivo.* – – –

Se tio ĉi „*viam*“ estas konstante *farata* de vi mem, tiam la alta forto de l' *spirito* atingos por vi la *venkon*. Vi tiam lernos unuigi *tion vian teran*, kiom ĝi ne estas forputranta, kun *tio via spirita* por ĉiam.

*Unuigita en vi mem, vi ne plu povos perdi en vi la vojon al Dio, ĝis iam vi atingas la altan celon de l' vojo en vi mem.*

## LA PERFEKTECO

Ekzistas sur la tero ne du homoj, kiuj estus *egalaj* en ĉiu rilato.

Sed kiel semero de planto kaŝe jam entenas ties *estontan formon*, tiel ĉiu homa spirito portas en si la *prabildon de sia estonta perfekteco*. –

*Infinoblaj* estas la vivoformoj, en kiuj *Dio* spertas sin *en si mem*...

*Infinoble* speguliĝas la vivo de la *Dieco* en la *homaj spiritoj*...

*Infinoblaj* estas la formoj de la *perfekteco*...

Vi povas atingi nur vian *propran* perfektecon *en vi mem*, kaj la perfekteco de ĉiu *alia homo* povas fariĝi al vi nur stimulo *serĉi* en vi mem la *vian*.

La perfekteco de *aliulo* estas ne la *via* kaj ne povas anstataŭi tion, kion vi preterlasas *en vi mem*.

Do starigu *vin mem* en la lumon de la eterneco, por ke vi ekkonu, kio *nur en vi* sopiras perfektigon!

Lasu flanke ĉiun *vantecon*, ĉiun *orgojlon* kaj ĉiun *deziron*, por ke vi ne igu vin aspiri la perfektecon de *aliulo* kaj malestimi la *vian*! Eĉ la plej granda inter la perfektigintoj povis atingi nur *sian* perfektecon, kaj vi egalos lin je *perfekteco*, kiam vi estos perfektiginta en *via* maniero.

Se li estus strebinta al *grandeco*, sciiĝinte pri granduloj inter la perfektigintoj, – vere, li neniam estus atinginta *sian perfektecon*!

Vi povas lasi vian *ambicion* aspiri en tiu ĉi *ekstera mondo* la plej altan rangon, kiun viaj kapabloj povas atingi, sed ĝi restu *malproksima de via strebado al la spirita perfekteco!* –

Se vi volas trovi en vi la *perfektecon* destinitan sole al vi, tiam sciuj, ke vi povas trovi perfektecon en vi nur *en la unuiĝo kun via Dio!* – – –

Tial mi montras al vi la *vojon al Dio*, por ke vi iam, en la unuiĝo kun Dio, estu *perfektigata*.

Nur kiam vi vivos vian vivon *unuiĝinte kun Dio*, ĝi atingos en Dio la *perfektecon*.

Estos via *propra* vivo, kiu tiel plenumiĝas.

Vi ne povas vivi la vivon de *Dio*, sed Dio vivas *en vi*, kaj vi povas, *unuiĝinte* kun Dio, trovi la *plej altan formon* de via *propra* vivo. – –

Tie ĉi, parabola komparo konduku vin al kompreno:

Rigardu lampon, en kiu filamento estas ardigata de kurento kaj sekve lumas!

Vi ankoraŭ egalas lampon, kiun la kurento *ankoraŭ ne* trafluas.

Sed kiam vi iam atingis la *unuiĝon* kun Dio, vi egalos lampon, kies apenaŭ videbla *plejinterno* ardas en radianta *lumo*. –

*La lampo mem* ne kapablas lumigi sin.

Nur kiam la kurento *unuiĝas* kun ĝia plejinterno, ĝi povas eklumi.

Se la lampo povus *senti sin mem*, ĝi ĉiam povus ekkonscii nur *sian plejinternon*, kvankam *ardante en lumo* tie, kie antaŭe ĝi estis malluma, – kaj nur en ĉi tiu plejinterno ĝi povus ekkonscii la *kurenton* pasantan tra ĝi. – –

Tiel same vi ĉiam spertos nur *vian propran plejinterton*, kiam vi estos unuigita kun via *vivanta Dio*...

*Via plejinterno tiam lumos en vi en radiantanta klareco*, – penetrite de la *vivanta lumo de la Dieco*.

Vi ne estos „*fariĝinta Dio*“, sed *la forto de Dio trafluos vin*...

En la tuta eterneco vi povos sperti *nenion alian ol vin mem kaj tion, kio fariĝas travivaĵo en vi*. – – –

Per la sama parabola komparo vi povas kompreni ankaŭ tion, kion mi celis dirante, ke vi trovos *vian perfektecon nur en Dio* kaj ke la perfekteco de *aliulo* neniam perfektigos *vin*.

La lampo *ne* trafluata de la kurento eble laŭkonstrue estas *taŭga* por *riveli mirigan lumon en si*, sed tamen ĝi restas *nelumigita*. Ĝia *perfekteco* montriĝas nur tiam, kiam ĝi estas enigita en *cirkvito*n kaj tiu ĉi estas *fermita*.

Tiel same ankaŭ vi povas sukcese krei al vi la *staton necesan* por via perfekteĝo, – sed *perfektecon* vi atingos nur en *unuigo kun via Dio*. – – –

Kaj se *multaj* lampoj ekzistas en iu loko, nur *tiu*j el ili lumiĝos, tra kiuj pasas la *kurento*.

*Senkurenta* lampo *neniam estos ardigata* de la lumado de *aliaj* lampoj.

Tiel same ankaŭ vi povas trovi *perfektecon* nur tiam, kiam vi strebas por *vi* al *via* perfekteĝo, kaj la perfekteco de ĉiuj *aliuloj* ekzistas vane por vi, tiom longe, kiom vi ne mem trovis *en vi* la *unuigon kun Dio*...

Vidu, temas pri tiu ĉi celo: ke vi trovu en vi *vian eternan vivon!*

Nur per la *perfektigo* de tio, kio en vi trovu perfektecon, vi povos atingi tiun eternan vivon. –

Vi *konsciiĝu* pri ĝi, kiel vi konscias vian *eksteran ĉiutagan vivon*, kaj vi *neniam* plu povos perdi la konscion pri via *eterna* vivo, tuj kiam vi *atingis* ĝin en vi...

Juĝu mem, ĉu la atingo de tiu ĉi alta celo ne estas inda je konstanta penado!

Certe, vi kelktempe bezonos la streĉadon de ĉiuj viaj fortoj por ne perdi ĝin el via vido...

Certe, la vojo postulos de vi multon kontraŭan al la avidoj de via tera animalo kaj ofte ne konforman al viaj teraj deziroj...

Kaj tamen vi malgraŭ via tuta penado *neniam atingus* tiun celon, se ne *helpo* estus prezentata al vi *el la direkto de la celo*. –

Finfine do ĉio dependas de tio, ĉu vi estas *preta akcepti* la helpon. –

La *komenco, mezo kaj celo* de la vojo estas *en vi mem*, kaj *nur en vi mem* doniĝos al vi la alta *helpo*. – – –

Vi tiam sentos, ke viaj fortoj ĉiutage kreskas, kaj kio unuafoje ŝajnis al vi tro malfacila, tiel ke vi preskaŭ perdis la kuragon, tio dum via plupaŝado apenaŭ kaŭzos al vi penon.

Ju pli vi proksimiĝas al la celo, des pli da helpo estos donata al vi kaj des pli certe vi sentos ĝin. –

*Dum via paŝado via forto kreskos*, ĉar pli kaj pli *kruda* fariĝas la vojo, ĝis fine vi atingos *la pinton de la sankta monto*...

*Tie via penado estos finiĝinta*...

Sed ne pensu, ke ankaŭ via *trovado* estos finiĝinta! –

*Senfina estas tio, kion vi trovis, kaj eterne vi trovos en ĝi ion novan. –*

*Unuiĝinte kun via Dio en vi, vi perfektigos tion, kio sole en vi volis trovi perfektecon, – kaj tiel vi fariĝos al vi mem superabunda trovaĵo, kiu eĉ dum infinita tempo ne estos elĉerpebla! – –*

*Tiam la regno de la substanca spirito pli kaj pli malfermiĝos al vi, kaj, paŝante plu de feliĉo al feliĉo, vi ekkonos, ke vi sur tiu ĉi tero jam staras meze de via *propra eterna vivo*. –*

*En vi vi trovis tion, kion vi iam serĉis super nubaj altaĵoj kaj ne povis trovi. –*

*Perfektiginte, vi lasos tion putrontan al putrado, ĉar estas preparata al vi el tio neputronta la nova naskiĝo en Dio. – –*

*Vere: – ĉi tie vi estos eterne ŝirmata! –*

*Via vojo al Dio estis nur la vojo al via *propra perfekteco*!*

FINO



Esperanto-tradukoj de aliaj libroj  
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj ĉe jena adreso:  
<http://boyin-ra.org/esperanto/>